

N°166
avril
mai
juin
2014

LA INFORMILO

N° 166
aprilo
majo
junio
2014

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

Nova Versio



Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Por eksterlando: 18€

Reta abono: 7,50€



Mélanie, jeune chanteuse de 18 ans a reçu un accueil soutenu de la part des participants du stage à Stockensohn début avril 2014.

Bonjour,

Je suis Mélanie. J'ai 18 ans et je prépare un Baccalauréat Professionnel à Chalon-sur-Saône non loin d'où j'habite.


C'est ma passion pour la musique et plus particulièrement le chant qui m'a poussée à accepter votre invitation. J'ai développé mes connaissances musicales grâce à l'école Gilbert Drigon de Chatenoy-le-Royal près de Chalon-sur-Saône.

Pour cette soirée je suis très heureuse de me joindre à vous afin de découvrir encore de nouvelles expériences; dans un premier temps, ce sera ma première représentation où j'interviendrai seule; mais aussi, je suis très fière de découvrir la langue universelle espéranto et le milieu espérantophone avec vous. Cette langue très riche, je la découvre progressivement d'abord en la chantant, puis aussi grâce à mon professeur, Lorenzo, sans qui cette expérience n'aurait pas eu lieu.

Je vous remercie d'avance pour votre accueil en espérant que vous passerez un bon moment.

Et le public de ce premier concert a été ravi !



Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
avant la fin de chaque trimestre		
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN		catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.ef@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asseseurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ino Catherine KREMER	03.87.01.00.39	
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur2@yahoo.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net	

Abono al La Informilo →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. En Storckensohn	13. EDE kaj rezultoj	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i></p>
2. Komitatanoj kaj menuo	14. Germana kongreso Erfurt	
3. Nepalo	15. Germana kongreso Erfurt	
4. Nepalo	16. Staĝo en Sankt-Peter	
5. Staĝo en Storckensohn	17. Staĝo en Sankt-Peter	
6. Staĝo en Storckensohn	18. Distra angulo	
7. Prelego Larsson	19. Kongreso en Chambéry	
8. Prelego Larsson	20. Kongreso en Chambéry	
9. Angulo de la prezidanto	21. Kongreso en Chambéry	
10. Libro-servo - Rakontoj	22. IFEF-kongreso	
11. Premio de El Popola Ĉinio	23. IFEF-kongreso	
12. Premio de El Popola Ĉinio	24. Nia fototeko	

SPECIALA RENKONTIĜO EN NEPALO

6-a ĝis 17a de marto 2014

Nepalaj esperantistoj organizis tre sukcesan “Specialan Renkontiĝon” de la 6-a ĝis la 17-a de marto 2014. Partoprenis ĝin ne nur nepalanoj, sed ankaŭ 17 gastoj el Ĉinio kaj eŭropanoj el Belgio, Bulgario, Danio, Francio, Pollando kaj Svislando. La aventuro komenciĝis en la ĉefurbo Katmanduo. La akcepto estis varma, laŭ nepala kutimo oni tuj post la alveno ornamis nin per florkolĉenoj. Post la enhoteliĝo en la komerca kvartalo *Thamel* en hotelo *Marshyangdi* ni iom promenis akompane de nepalaj esperantistoj tra urbaj stratoj plenaj je turistoj.



La sekvan tagon ni vizitis lokajn vidindaĵojn: hindan templon *Pashupatinath* kaj budhan stupaon *Boudhanath*. En la proksima urbo *Patan* ni promenis kaj admiris artaĵojn faritajn el ligno. Elstaras tie la Kriŝna templo. Vespere okazis interkonatiĝo kun nepalaj samideanoj. La prezidantino de la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) Indu Devi Thapaliya, Mukunda Raj Pathik kaj aliaj membroj post solenaj paroladoj malfermis la eventon. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj el la orienta parto de Nepalo familio Pokhrel, kies ĉarma 13-jara filo bonege parolis Esperanton.




Sabate la 8-an de marto ni vojaĝis al la nacia parko *Chitwan* - Koro de ĝangalo. Unue ni pirogumis kaj poste ni vizitis elefant-farmon kaj rajdis



elefantojn. Ni estis bonŝancaj vidi deproksime rino-cerojn kaj aliajn bestojn. En la parko troviĝas simioj, cervoj, aproj, multaj specoj de birdoj, krokodiloj kaj laŭdire eĉ tigroj, kiujn ni feliĉe ne renkontis. Impresis grandegaj termitejoj. Post la reveno okazis kelkaj prelegoj: pri la Esperanto-instruado laŭ la metodo BEK rakontis Peter Wraae el Danio. Arie Bouman el Belgio prezentis bildojn el Islando kaj parolis pri siaj spertoj dum la 98-a UK en Rejkjaviko. La sekvan vesperon ni spektis tre belan folkloran programon de popolaj indiĝenaj dancoj.

En la urbo *Lumbini* ni vizitis la naskiĝlokon de Budho. Ni admiris *Maya Devi* templon kaj ankaŭ aliajn vidindaĵojn. En *Palpa* ni tranoktis. En la urbo *Pokhara* renkontis nin loka esperantisto Himalal Parajuli kaj pretigis por ni la jenan programon: matene ni per malgranda boato navigis sur la *Phewa* lago ĝis insuleto, kie troviĝas hinda *Barahi* templo. Sinsekve ni vizitis *Binhdabasini* templon, *Mahendra* kavernon kaj *Seti* gorĝon. Post la tagmanĝo ni vizitis la Internacian Himalajan Muzeon kaj poste ni ekskursis al la pagodo de Paco. Fine de la tago ni ankoraŭ sukcesis vidi *Davis* akvofalon. Vespere ni povis ĝui hotelan dancprogramon. Sekvan matenon ni ellitiĝis tre frue kaj veturis al la montara vilaĝeto *Sarangkot* spekti sunleviĝon kaj vidi la Annapurna montaron. Poste ni havis liberan tempon por promenado aŭ aĉetado. Posttagmeze





okazis serio da prelegoj. Peter el Danio prelegis pri la dana filozofio "Martinus", Eduard Kusters el Belgio pri la "Belga kompromiso", Pierre Bouvier el Francio klarigis, kial Esperanto estas pli simpla kaj efika ol baza angla lingvo. Barbara Pochanke el Svislando prezentis sian Esperantokarieron kaj ĉe la fino Roman Dobrzynski el Pollando montris ege interesan filmon pri Oomoto, kiun li mem reĝisoris kaj produktis. Post solenaj paroladoj la vespero finiĝis per komuna vespermanĝo.

Sabate la 15-an de marto ni forveturis al Katmanduo kaj vespere ni ĉiuj estis invititaj al solena geedziĝa festo. S-ro Parashar Rijl edzigis sian filon. Ni ĝuis belan festadon kun viva muziko kaj bongusta manĝo. Dimanĉe en Nepalo okazis festo de koloroj - *Holi*. Dum ĝi homoj, sed ĉefe gejunuloj, kolorigas siajn kaj aliulajn vizaĝojn kaj vestaĵojn. Ankaŭ ni ne eskapis tiun eventon kaj estante farbitaj ni promenis inter homamaso. Matene ni vizitis religian ensemblon *Swayambhunath*, kiu troviĝas sur arbokovrita monteto. Ĝi estas konata kiel templo de simioj, kaj vere ili kuris ĉie samkiel en *Pashupatinath*. Ĉi-foje la tagmanĝon pretigis volontuloj en la sidejo de NEspA. Ni ĝoje babilis, kantis kaj dancis. Ankaŭ dum la adiaŭa vespero ni bone amuziĝis. Nepalanoj donacis al ĉiu tipan ĉapon *topi*, ŝalon kaj monujon. Maja Gorova el Bulgario prezentis sian landon kaj ĝian kulturon. Ilse Jacques el Belgio dankis al ĉiuj pro la bela renkontiĝo, kiun ŝi povis preskaŭ tute partopreni malgraŭ sia paŝproblemo.

La Speciala Renkontiĝo 2014 sub la gvido de Bharat K. Ghimire estis tre sukcesa, ĉiuj estis ravitaj. Ni kore dankas al la organizantoj de tiu unika evento kaj gratulas ilin pro la iniciato organizi tiun-ĉi specan aranĝon. Mi esperas, ke la movado en Nepalo daŭre floros kaj plifortiĝos. Sukceson al vi!

Liba Gabalda



Organizita de MULHOUSE  ESPERANTO En amikaj rilatoj kun BAVELO	75a printempa staĝo de  Okazis la 4 / 5 / 6-ajn de aprilo 2014 En la Feriejo Le Torrent 4, rue de Mollau, 68470 STORCKENSOHN
--	--

Antaŭ 13 jaroj en 2001 jam okazis en la feriejo Le Torrent en Stockensohn staĝo de Esperanto France-Est. Ĝi estis organizita de Mulhouse-Esperanto kunlabore kun TAKE kun priprofesiaj prelegoj.

En 2014 nov-aliĝinta samideano: Yves STUTZ iniciatis la organizadon de la 75a printempa staĝo en la sama domo Le Torrent. Dank'al pretaj kunlaborantoj kaj gvidantoj eblis proponi divers-nivelajn kursojn gvidatajn de Ginette MARTIN, Roberto KUENY kaj Edmond LUDWIG .

Nia ĉi-jara gvidanto de la seminario, Hannes LARSSON, naskiĝis en Finnlando, studis tie, sed

poste laboris profesie kaj akumulis spertojn kiel altnivela inĝeniero en diversaj landoj. Liaj spertoj ankaŭ multnombras en diversaj ŝatokupoj. Ilin li malkovrigos al vi.

Por via distro zorgis Roberto KUENY per poezia deklamado ! Vera aktoro li estas ! Kaj sabate vespere vin agrabligis per sia juneca voĉo juna talento en Esperantujo, Mélanie PRIN, kiu jam aŭskultebliĝis ĉe Pola Retradio kaj daŭre aŭskultebliĝas sur la reto. La kanzonojn plejparte verkis Lorenzo TOMMEZZOLI, kiu akompanas ŝin.

Por la vendreda programo Thierry Saladin prezentis la temon "Esperanto komuna lingvo en Eŭropo" Li iniciatis taŭgajn T-ĉemizojn kun sloganoj en diversaj lingvoj. Pluraj personoj pretis ilin akiri.

Poste eblis spekti fotojn pri la antaŭ-kongreso en Islando, fare de Andreo.

Roberto estis preta por prizorgi la knajpon, nian Esperanto-trinkejon. Ĝi ebligas fini la vesperon ĉe bongusta biero aŭ alia trinkaĵo kaj kune amike babilii.



Plej multaj staĝanoj volonte partoprenis la ekskurson al la milita tombejo Vieil Armand aŭ Hartmanns-Willerkopf. Ĝi eĉ estis dezirita de pluraj partoprenantoj, ĉefe memore al la terura unua mondmilito okazinta antaŭ 100 jaroj.

Tie atendis Edmond por poste gvidi la tutan grupon kaj klarigis la historiajn eventojn, kiujn Alzaco suferis en la du lastaj jarcentoj.

Je alteco de 956 metroj super de la alzaco ebenaĵo je rekta distanco je 7 km de Thann kaj 6 km de Cernay. Tie ĉefe en 1915 okazis teruraj bataloj kun dudek-kvin-mil mortintoj.

Ni povis vidi restaĵojn de la tranĉeoj francaj kaj germanaj kaj monumenton honore al la mortintoj.



Restas la bedaŭrinda fakto, ke la instigantoj diversflankaj de tiu ĉi milito sukcesis atingi rekordon: neniam ĝis nun oni mortigis dum milito tiom da homoj! Tiun rekordon ebligis la modernigo de la mortigo-maŝinoj! Kaj tiu amas-buĉado tiom surprizis, ke oni post ĝi volis kredi, ke tiu ĉi milito estos la lasta!!! Ni scias, ke 21 jarojn poste rekomenciĝis la katastrofo! Kaj de tiam ne ĉesis la militoj en la mondo! Kia malhoma homaro!



Post la reveno al Stockensohn la tagmanĝoj estis pretaj en agrabla manĝo-salono de la domo.



Edmond prezentis la programon de la posttagmezo kun la diversaj kursoj kaj prelegoj. En la granda salono, kie troviĝis la libro-servo, li prezentas novajn librojn tuj akireblajn. Hannes Larsson prelegis pri violonoj, pri ties fabrikado kaj evoluo en la historio. La paroligan kurson por progresintoj gvidis Edmond Ludwig kun deko da lernantoj. Roberto Kueny prizorgis la kurson de progresantoj. Ginette Martin gvidis verajn komencantojn.



Roberto deklamas plurajn fablojn de La Fontaine antaŭ atentema publiko.



La plej grava kaj atendata parto de la vespero estis la koncerto de Mélanie, 18-jara liceanino el la regiono de Chalon-ĉe-Saono.

Edmond prezentis la artistojn Lorenzo Tomezzoli, gvidanton kaj la junan kantistinon Mélanie.

Per komputilo li prezentis sur granda ekrano la tekston de la kantoj en Esperanto, en la franca kaj ankaŭ en la itala. Tiel estis pli facile sekvi la kantojn de Mélanie kaj samtempe ĝui ŝiaj agrablan voĉon. Multaj el la kantoj estis tre romantikaj kiel: *Tango de amo*, *Kaptita estas via kor'*, *Valora koncerto*, *fulma enamiĝo*,



Jen ŝia kompakt-disto kun 14 kantoj. Ili estas aŭskulteblaj ĉe <http://kaprinido.perso.sfr.fr>



NE MANKAS KORDOJ AL LA VIOLONO DE HANNES LARSSON

Okaze de la 75a Regiona Staĝo de Esperanto (4-6.04.2014) de Espéranto France-Est en Storckensohn, Hannes Larsson prelegis sabate posttagmeze pri violono kaj dimanĉe matene unue pri distraj matematikoj kaj poste pri kiel li spertis Esperanton.

Hannes Larsson naskiĝis en Nokia, Finnlando, en 1931. Post diplomiĝo de la Teknika Universitato de Helsinki, li estis inĝenero en Finnlando, Francio, Italio kaj Belgio. Li specialiĝis pri la rezisto de strukturoj kaj materialoj kaj laboris en du kampoj: la satelitoj kaj la nukleaj reaktoroj.

Junaĝa Hannes estis unua violono de studenta simfonia orkestro. Lia patro konstruis violonon, kiun Hannes posedas kaj kiun la aŭskultantoj de tiu prelego en Storckensohn povis rigardi kaj eĉ tuŝi.

Hannes jam prelegis pri la violono dum la Universala Kongreso 2013 en Rejkjaviko kaj okaze de aliaj internaciaj eventoj. Tio estas por substreki la altnivelon de tiu prelego en Storckensohn kaj ĝi estis ege interesa kaj permesis kompletan vidon pri tiu belforma instrumento kaj aŭskulton de ĝia bela sono. Estis prezentita historio kaj fabrikado de la violono, kaj la faktoroj, kiuj influas la kvaliton de la sono kaj la diversaj teknikoj por eltiri el ĝi belan muzikon. La prelego estis klare ilustritaj de projekciitaj fotoj, desegnaĵoj kaj de tekstoj. Hannes ankaŭ aŭskultigis multajn ekzemplojn pri la manieroj ludi violonon kaj partojn de ĉefverkoj interpretitaj de la plej famaj virtuozoj.

Verŝajne estas ligoj inter muziko kaj matematiko. Hannes sukcesis dum la sekva prelego distri, sed ankaŭ klerigi siajn aŭskultantojn pri legendoj, mirindaĵoj, paradoksoj, logiko, falsaj pruvoj, la ora

nombro, aritmetikaj serioj, probabloj, statistiko, eksterpolado, eĉ Katerina la 2-a (la Granda) de Rusio, la lasta teoremo de Fermat, ktp. Estis riĉega prelego, kiu donas envion interesiĝi kaj profundigi pri tiaj temoj.



Dum sia tria prelego Hannes rakontis kiel li spertis Esperanton, kiel li ellernis la Internacian Lingvon dum du jaroj en sia emerita aĝo kaj kion li faras por Esperanto. En 2005 ĉe budo dum asocia forumo en Aix-en-Provence li parolis kun homo, kiu partoprenis la Universalan Kongreson

en Pekino en 2004 kaj prezentis la libron "Langues sans frontières" de Georges Kersaudy. Post miro ke ĉinoj tiom interesiĝas pri Esperanto, ke pli ol 2000 homoj el 51 nacioj partoprenis al tiu kongreso de Pekino kaj legado de la libro de Kersaudy, Hannes decidis lerni mem Esperanton per La Metodo Assimil. Li ankaŭ partoprenis al la kunvenoj de la Esperanto Klubo en Romans-sur-Isère kaj legis multajn librojn en Esperanto.

Tamen li iris de surprizo al surprizo lernante la lingvon kaj partoprenante al diversaj internaciaj eventoj de Esperanto. En grandega libro-vendejo de Parizo, Gibert Jeune, kie oni trovas multajn librojn pri ĉiuj lingvoj kaj dialektoj, sed oni ne trovas librojn pri Esperanto eĉ se en la enirejo oni afiŝas la etaĝon de la breto de esperantaj libroj. La programaro Word por skribi tekstojn ne havas esperantan version, nek korektilon, nek specifan ĉapelitajn literojn de Esperanto, do oni povus konkludi, ke Esperanto ne ekzistas !

Li ne ŝatas la esperantigon de la propraj nomoj kaj dokte defendis sian vidpunkton. Li eĉ skribis humuran artikolon por iom primoki tiun malbonan praktikon, kiun André Cherpillod nomas "Malesperanto" en alia artikolo.

Kion fari por Esperanto? Denove Hannes proponas siajn raciajn kaj praktikajn vidpunktojn. Unue li nin invitas forgesi la revon pri sankta harmonio kaj rezigni ŝanĝi la mondon. Li pensas, ke oni devus

rigardi la aferon laŭ la ekonomia vidpunkto, grandigi la ebligojn uzi Esperanton per komputilo kaj ĉe Interreto, vendi librojn en librovendejo, laŭ ĉiuj manieroj dekobligi la nombron de esperantistoj, skribi librojn pri fako aŭ afero, kiun oni regas kaj enŝovu en ili ĉapitron pri Esperanto. Tion li faris mem en 2012. Li aperigis libron en anglan lingvo "Cross-Country Skiing Around the World", Ski-kurado Ĉirkaŭ la Mondo, ĉe la famkonata - en la Esperanto-movado - ĉeĥa eldonisto Kava-Pech.

Tiu libro temas pri la popularaj longdistancaj konkursoj en ski-kurado. Oni malkovras en tiu libro ke la aŭtoro Hannes Larsson estas tre konata ski-kuranto. Li atingis diversajn titolojn en skikurado, fondis *the International Association of Worldloppet Skiers (IAWLS)*, la Internacian Asocion de skikurantoj, kies prezidanto li estis dum naŭ jaroj. La libro bele ilustrita per multaj koloraj fotoj, priskribas la skikonkursojn tra la tuta mondo, trejnadon, renkontiĝojn de rimarkindaj personoj, travivaĵon, anekdotojn, kelkajn teknikajn trajtojn de la konkursoj kaj proponojn por iliaj pliboniĝoj. Kaj finfine Hannes, kiu parolas sep lingvojn, prezentas la internacian lingvon Esperanto kaj anoncas ke oni povas komuniki kun IAWLS en Esperanto.



Strange : tiu homo lernis la lingvon post 2005 estinte 74-jara kaj poste sufiĉe rapide prelegis en Esperanto pri diversaj temoj dum diversaj internaciaj esperantaj eventoj kaj tamen ankoraŭ nun ski-kuradas. Ĉu li estas fenomeno de la naturo? Ne, nur homo, kiu ĉiutage laboras por esti mense sana en sana korpo. Jen la sekreto de la bela, bona kaj longa vivo : lernado, agado, sporto, muziko, matematiko kaj Esperanto.

En tri prelegoj Hannes Larsson kondukis la publikon de la muziko, kie estas la emocioj kaj la sentoj por kiuj ne estas vortoj, poste tra matematikoj, kie estas loko por distri kaj iloj por racie pripensi ĉion, ĉar en ĉio estas matematiko, por atingi fine kiel kronado Esperanton, ĉar jen la vortoj por ĉion diri al la tuta homaro kaj tiel facile interkompreniĝi.

La tri prelegoj estis bonege prezentitaj kaj evidente varmege aplaŭditaj.

Bernard Behra

4a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) de la 19a ĝis la 24a de oktobro 2014 ĉe la rivero Mozelo.

Partoprenu en piedaj ekskursoj laŭlonge la riveron Mozelo. Vizitu la mondfaman burgon Eltz, rigardu kelkajn pitoreskajn urbetojn kaj ĝuu vingustumadon en la kelo de vinbieno. Kompare kun 2013 grandparte nova programo. Nur 30 lokoj rezervitaj.

Fiksa tranoktejo en la kastelo Marienburg (trajnstacio Bullay).

Ĉiutagaj transportoj per trajno aŭ Mozela ŝipo.

Detalajn informojn kaj aliĝilon vi trovas ĉe www.esperanto.de/ema Komisiitoj:

wolfgang.bohr@esperanto.de (programo), rudolf.fischer@esperanto.de (aliĝoj, financoj)

26-a Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage, Francio.

La plej grava internacia semajnfino en Francio, norde de Parizo okazos la 15-16 an de novembro 2014. Denove ĉi-jare bunta programo kun JOMO, Katalin kaj Martin KOVATS, Pascal kaj Rose-Marie VILAIN, Franjo LEVEQUE kaj Michel DECHY. La partoprenantoj povas elekti inter tri diversnivelaj lingvokursoj : studi la vivon kaj verkaron de Georges Lagrange (Serĝo Elgo), sin prepari esti helpanto por la jubilea UK, eklerni kaj plulerni la lingvon kun Tinĉjo aŭ kanti en koruso.

Koncerto, impona libroservo, ekspozicio de artaĵoj kaj vizito de la bela marurbo Le Touquet kompletigos la studojn. Info : Arlette kaj Edmond Plutniak 2, rue Ste Marguerite, Résidence Les Archers Apt 23 62000 ARRAS (Francio).

aplutniak@esperanto-nord.org 26-a Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage, Francio.

Karaj gesamideanoj,

Angulo de la prezidanto

Dank'al la klopodoj de niaj samideanoj (ankaŭ en EFE) pli ol 30 000 francaj balotintoj voĉdonis por la listo EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto). Tre certe multe pli granda nombro vidis la nomon ESPERANTO, legis la programon de la partio kaj spektis la video-prezentojn ĉe la televido aŭ sur la ekranoj de siaj komputiloj. Ni ja sciis, ke ni ne havos deputiton en la Eŭropa Parlamento, sed pri la reklama efiko ne eblas dubi.

Dum la Ĝenerala Membrokunveno de EFE en la departemento Vogezoj, en Sanchey, apud Epinal, la komitato decidis pristudi jam ellaboritan proponon de Roberto KUENY pri organizo de ĉiujara TAGO DE ESPERANTO. Sen serioza preparo tio ne eblos. La komitato pridiskutos la aferon perrete kaj ni esperas, ke la unua tia tago povos okazi en 2015. Ek al la laboro.

E. L.

Malkovru la lingvojn de la mondo! Ankaŭ Esperanto ne estas forgesita !



<http://www.mundolingua.org/>

Omniprésent jusqu'à l'intimité de nos rêves, le langage joue un rôle déterminant dans notre vie. Sur près de 170m², l'exposition permanente MUNDOLINGUA vous invite à découvrir ses secrets à travers une visite insolite de ses nombreuses alcôves thématiques.

ASSOCIATION MUNDOLINGUA

10 rue Servandoni – 75006 Paris tél. +33 (0)1 56 81 65 79 contact@mundolingua.org

Ouvert tous les jours de 10h – 19h

Malamu vin, unu la alian de Manuel de SEABRA (Eldonejo MONDIAL - Novjorko)

Jam en 2009 aperis tiu verko de Manuel SEABRA, kiun li nomas romano. Certe, ankaŭ la aŭtoro tuj nuancigas tiun kvalifikon pro la fakto, ke la libro konsistas en aro da izolaj tekstoj. En ĉi tiu libro li rakontas plej diversaspekte pri Portugalio, pri la vivo en tiu ĉi lando ekde 1932 sub diktaturo kaj post la Revolucio de la Diantoj sub respubliko ĝis 2004.

Pluraspekte li pentras al ni la vivon de plej diversaj personoj tra la eventoj kaj li prezentas al ni siajn klarigojn pri la kiamoj de la malfacila vivo de la plejmulto de la popolo. Pro tio li ankaŭ prilumas la historion de la lando ekde la komenco de la dua jarmilo ĝis la sekvoj de la aliĝo al EU.

Tre kleriga verko, kiun oni povas legi laŭ sia propra ritmo, kio lasas tempon por cerbumi pri la legitaĵoj. Koncerne kelkajn tekstojn : ili iom min disturbis. Sed legu kaj juĝu mem !

Entute : ege leginda verko.

E.L.

Nova libro de nia samideano Roger CONDON

Uragano – Un ouragan dans la tête - Franclingva rakonto pri la lukto de Denis kontraŭ kapdoloroj neelteneblaj. La kuracistoj ne trovas efikajn kuracilojn. Denis do luktas , sola. Revivigo de memoraĵoj ebligas al li iom mildigi la suferojn: Alĝeria milito, Valériane (la bela alĝeriano), la neatingebla Odile. Laboro kiel bonvolemulo en feriejo por handikapuloj en la skipo de la por iom da tempo retrovita Odile sukcesas mildigi la suferojn. En la libro ne mankas dankoj al la familio kaj al Esperanto. La Internacia Lingvo iĝis parto de lia nun pli sendolora vivo.

Ekde julio, la libro estos mendebla ĉe Amazon kaj en la francaj librovendejoj, membroj de la "Hachette" grupo. Ĝi estas aĉetebla ĉe la eldonisto je la adreso : <http://www.bookelis.com/romans/3456-ouragano.html>



El nia libroservo

Informoj



⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Sankt Peter la 17/19ajn de oktobro 2014.

Tie multaj novaj libroj atendos vin !

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto

France Est : <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Ĝis baldaŭ !

Jean-Luc Thibias

Rakonto de Denise :

Kiam mi estis juna, mi posedis unu katon, tre belan, grizan, longharan, ĝi nomiĝis "Mignon". Post mia edziniĝo, mi prenis mian katon en korbeton sur biciklo ĝis mia loĝejo, ĉirkaŭ 12 km fore.

Dum tri aŭ kvar tagoj, ni gardeme fermis la fenestron. Poste ĝi ŝajnis kutimiĝi al la domo, do mi povis malfermi la fenestron.

"Mignon" komencis tualetadi sian belan felon. Bone!

Sed vespere, vane mi atendis la katon, ĝi ne reiris ĉe min.

Tri semajnojn pli poste, kiam mi vizitis miajn gepatrojn, mia patrino diris:

- Via "Mignon" revenis. Iun matenon, ĝi atendis antaŭ la pordo, malsata, kaj malsatega, ĝi hastis al la pelveto de la aliaj katoj.

Noto de Ginette : Finfine, Denise ne reprenis sian katon.

Ĉe Ginette: transgeneracia kaj diversnacia renkontiĝo, la 7an de majo 2014

Miaj irlandaj amikoj Chris kaj John venis en Saulxures-sur-Moselotte por nur tri tagoj kaj du noktoj. Mi deziris, ke ili renkontu maksimuman nombron de esperantistoj. Kiel fari? en la kultur-domo de Gérardmer ne eblas organizi renkontojn dum ferioj, ĉiuj salonoj estas okupataj de grupoj de infanoj.

Mi decidis inviti ĉe mi por unu posttagmezo samtempe miajn klubanojn kaj la familion Masala. Inviti la familion Masala estis la bona ideo, ĉar ili kune konsistigas 7 esperantistojn : la gepatroj kaj la kvin infanoj, al kiuj la patro ĉiutage parolas en Esperanto (fakte la unujara Joseph ankoraŭ ne parolas, li ĉefe dormis en sia speciala lito). De mia klubo venis 2 virinoj kaj unu edzo. Entute ni estis 13. Ĉiuj unue iris viziti la lagon kun John. Dume Chris kaj mi preparis diversajn varmajn trinkaĵojn, kiujn ni metis en termos-botelojn. Mi jam antaŭpreparis du kukojn kaj metis ludilojn sur la planko-tapiŝon por infanoj.

Kiam ĉiuj revenis de la lago, kia vivo subite en la domo! la infanoj tuj iris al la ludiloj, la adultoj sidis ĉe tablo, kaj John tuj iris kun infanoj. Li ŝategas ludi, li ŝategas infanojn, kaj kun la infanoj li ne povis paroli alimaniere ol en esperanto, ĉar li ne konas la francan. Bruno kaj Anne estis ege kontentaj, ke iliaj infanoj povis eksperimenti la lingvon, ili malofte renkontas tiun eblon. Jes, John kaj la infanoj estis la plej perfekta ekzemplo de uzo de Esperanto.

Ĉe la tablo, la adultoj iom parolis Esperanton, sed iom da franca lingvo venis de tempo al tempo. La infanoj ne kaŭzis ĝenon ĉar, kiam ili deziris manĝi aŭ trinki, ili faris tion starantaj apud ni kaj tuj revenis al siaj ludoj.

Ĉiuj estis ege feliĉaj pri la aranĝo, la plej kontenta estis John, ĉar li mem edukis siajn filojn en la esperanta lingvo ekde la naskiĝo, kaj li imagis sin reveninta en tiama tempo, kiam liaj infanoj estis tute malgrandaj kaj respondis al li en Esperanto.

Anne kaj Bruno diris: kiu bona infan-zorganto, ideala por niaj infanoj!

kaj John diris: Mi estis tiom kontenta aŭdi la infanojn respondi al mi en Esperanto !

La posttagmezo finiĝis kun la kontento de ĉiuj.



Ginette MARTIN



**LANGUE COMMUNE
ÉQUITABLE POUR L'EUROPE**

La 25an de majo 2014 okazis la balotoj por Eŭropa deputitoj. EDE prezentis listojn en ĉiuj regionoj en Francio. Jen la listo proponita de Ginette Martin en Orienta Francio.

Espéranto

Langue commune équitable pour l'Europe

Circonscription Est

01 Geneviève Martin
02 Cyrille Hurstel
03 Claire Lauffenburger
04 Fabien Tschudy
05 Jacqueline Poux
06 Thomas Cordonnier
07 Marie-Claude Boreggio
08 Dominique Jacquin
09 Liliane Collin
10 Jean-Christophe Vincen
11 Genevieve Pineda
12 François-Xavier Gilbert
13 Simone Cajelot
14 Bruno Schmitt
15 Bénédicte Papin
16 Robert Kueny
17 Christine Redon
18 Jean-Pierre Schneider

Liste présentée par :



Soutenue par :



**ESPÉRANTISTES
Geneviève Martin**



Jen la rezultoj en niaj departementoj kaj en iuj urboj.

Tête de liste : Geneviève Martin (Gérardmer)

Nom officiel : Espéranto langue commune équitable pour l'Europe
Positionnement politique : mouvement plaidant pour le développement de la langue neutre et facile construite par Ludwig Zamenhof en 1887.

Trois idées-forces : ▶ Construire l'Europe du citoyen et donner du poids à la société civile européenne. ▶ Démocratiser la communication internationale à l'aide d'une langue internationale équitable et accessible : l'espéranto. ▶ Faciliter la mobilité et les échanges.

Alsaciens sur la liste : non précisé sur les documents électoraux.

DNA 23.05.2014

Departementoj	Nombro da voĉoj	procentaĵo
54	317	0,18
25	346	0,22
57	572	0,21
67	470	0,15
68	404	0,19
88	315	0,25
90	82	0,2
urboj		
COLMAR	46	0,3
MULHOUSE	28	0,16
METZ	34	0,13
NANCY	45	0,2
SAINT-LOUIS	10	0,27
SELESTAT	8	0,15



Pour une démocratie efficace et solidaire, l'application totale de la Déclaration universelle des droits de l'homme :

WWW.EDE2014.FR ★ WWW.E-D-E.FR

(vous pouvez télécharger sur www.ede2014.fr les documents de campagne et le bulletin de vote en cas de manque)

Konkurso de Verkado

EPĈ-2013



Konkurso de verkado - Concours d'écriture

En 2013 Catherine, anino de nia klubo en Nancio, partoprenis en konkurso de verkado okazigita de EPĈ (Ei Polpola Ĉinio), kiu invitis ĉiujn Esperantistojn sendi sia(j)n verkaĵo(j)n el tri branĉoj : novelo, prozo kaj poemo.

Ŝi sendis du kontribuojn kaj ŝi gajnis du premiojn:

la duan premion en la fako novelo por la artikolo **“Kiam mi estis knabineto”**, kaj la trian premion en la fako poemo por la artikolo **“Tagpenso”**.

Poste ŝi ricevis tri belajn librojn fotitajn, kaj du diplomojn.

Do kiel diras la pripensinda proverbo “Kion vi priklopodas, al vi okazas”, ŝi esperas por la konkurso 2014, partoprenu multe pli da partoprenantoj.

Jen ĉiuj rezultoj de la konkurso pri verkado EPĈ-2013 :http://www.espero.com.cn/2013-12/19/content_30946178.htm

Jen ĉiuj verkaĵoj de la konkurso pri verkado EPĈ-2013 : http://www.espero.com.cn/node_7184275.htm

Jen kondiĉoj por partopreni en dua konkurso EPĈ-2014 :http://www.espero.com.cn/2014-02/13/content_31460347.htm

En 2013, Catherine, membre de notre club à Nancy, a participé au concours d'écriture organisé par EPĈ (Ei Polpola Ĉinio), qui invitait tous les espérantistes à envoyer leur(s) composition(s) classées en trois parties : nouvelle, prose et poème.

Elle a envoyé deux compositions et elle a gagné deux prix : la 2ème prix dans la partie nouvelle pour “Kiam mi estis knabineto” (Quand j'étais une petite fille) et le 3ème prix dans la partie poème pour “Tagpenso” (pensée du jour).

Elle a ensuite reçu 3 beaux livres et 2 diplômes.

Alors comme dit le proverbe “Kion vi priprenas, tio al vi venas”, (Tu t'emploies à ce que cela t'arrive), elle espère beaucoup plus de participants au concours 2014.



Kiam mi estis knabineto

Kiam mi estis knabineto, mi kredis, ke poŝ-televidilo - tute eta televidilo, kiun oni povas enŝovi en la poŝon aŭ gardi ĉemane - jam ekzistis. El radioaparato mi aŭdis ion pri ĝi, do certis pri la ekzisto de la poŝ-televidilo.

Tiam mi imagadis min rigardanta ĝin, ekstere, ĉe-strate, ankaŭ en la korto de la lernejo, sola aŭ kun amikinoj. Mi pensis, ke per la televido mi neniam plu estos enuinta. Do mi antaŭgojis, kiam mi celis posedi unu post nelonge. Kaj dum du semajnoj mi sukcesis ŝpari sufiĉe da mono, entute 0,60 franko, por aĉeti tiun deziregatan televidilon.

Do sekve mi aliris al tabako-trinkejo, ĉar ankaŭ ĉi tie oni vendis gazetojn. Kaj el la radio aŭdiĝis: “Aĉetu vian poŝ-televidilon, vi trovos ĝin en ĉiuj gazetejoj, por nur 60 centimoj de franko. . . !”. La daŭrigon, mi ne scias kial, neniam aŭskultis. Tamen se mi estus pli atentinta pri la parolado, tio estus evitinta al mi gravan elreviĝon.

Mi ekeniris iom timinta, sciante, ke daŭre troviĝis stare pluraj virklientoj ĉe la verŝtablo. Kun kubutoj ĉiam apogitaj, ili ĉiuj ekturnis senesprimajn okulojn al la pordo por rigardi tiun, kiu estis eniranta. Mi ne ŝatis tiajn ĉi scivolemajn vizaĝesprimojn. Antaŭ la kontoro mi atendadis tiun, kiu estis verŝanta la vinon kaj la bieron al timindaj viroj. Mi es-

tis tiom feliĉa, kiom mi povis pacience atendi la vendiston.

- Saluton knabino! Kion vi volas?
- Saluton Sinjoro! Nu... Nu...
Nu... Bombonojn... por 60 centimoj, mi petas.
- Eku! Servu vin! Vi scias kalkuli, ĉu ne?
- Ho jes!

Ne estis multe da elekto en ĉi tiu vendejo. Kutime mi preferis aĉeti miajn bombonojn en la panejo aŭ en la ĉiovendejo. Alpreninte rapide tri buletojn de maĝumo, mi sukcesis gardi sufiĉe da malvarmsango por elekti ilin de diversaj koloroj: Unu verdan buleton (estis mia plej ŝatata koloro), unu flavan buleton (estis mia dua plej ŝatata koloro), unu ruĝan...

Salutante sen vidi kiun ajn, mi eliris prompte de la trinkejo, malfeliĉa, sentante min stulta.

Kvankam la trinkestro ne rimarkis kion ajn, mi hontis pro mia naiveco. Tamen mi jam aĝis ok jarojn, do kial mi estis ankoraŭ tiom kredema?

Feliĉe, antaŭe mi nenion sciigis al miaj gepatroj pri baldaŭa aĉeto, ĉar mi volis surprizi ilin. Ni ankoraŭ ne havis televidilon hejme - la sola, la lasta familio en la vilaĝeto! Nia najbaro, kiu estis naŭinfana familio, jam posedis, kvankam neriĉa, eble eĉ pli ol la nia, ĉar la vestoj de la infanoj ĉiam estis nenovaj. Mia patro ĉiam ripetis la saman, kiam mi demandis lin, kial ni ankoraŭ ne havas televidilon: "Ni ne posedas la necesan monon. Nun ne eblas, ni vidos pli malfrue!" Tamen en mia familio estis nur tri infanoj. Mi multe enuis hejme, kaj ŝategis spek-

ti la televidon. Por satigi tiun deziron, mi devis iri dekstren kaj maldekstren en la vilaĝo por havi la eblon spekti ĉe amikinoj cirkon ĵaŭde kaj kelkajn usonajn seriojn sabate. Dimanĉe mi ankaŭ iris al la hejmo de sinjorino Helena, por ke ni ambaŭ televidu longan filmon. Sed ne ĉiudimanĉe, ĉar mia panjo ne volis ke mi tiom ofte.

Ankaŭ al miaj amikinoj mi ne parolis pri la poŝ-televido. Feliĉe! Kia honto alie!

Ĝis kiam la trinkestro alvenis al mi, mi ekvidis dekon da poŝ-televidoj. Ili estis elmontritaj en prezentilo alrokita al muro super de la kontoro. Estis malgrandaj revuoj, sur kies kovrilo estis skribita "POŝTELEVIDO" per grandaj blankaj literoj en ruĝa rektangulo en formo de ekrano. Tiu nova revuo enhavis ĉiutagan programon de la televido vidota dum unu semajno. Jen mia reva poŝtelevitilo... estis nur magazineto. Pro ĝia famiĝo oni ofte parolis pri ĝi per radio, kaj tiam mi tiom deziregis havi televidilon (etan aŭ normalan), ke mi kredis ĉion, kion mi volis kredi.

Ĝis hodiaŭ, preskaŭ kvindek jarojn poste, mi neniam aĉetis ĉi tiun magazinon (nun ĝi ankoraŭ ekzistas). Estas iom mia venĝo. Sed ĉefe estas pro tio, ke la magia fenestro delonge perdis multon de sia magio por mi.

Catherine Hel



Tagpenso

Enpensanta mi pensadas

Subite mi ekpensas

Ho! Ho!

Ĉu mi estus elpensema pro tio?

Ne! Mi estas nur pensanta, ne elpensanta

Ja!

Domaĝe!

Eble... Peĉ!

Pri kio mi ĵus pensis, mi forgesis

Kia senpripensulo mi estas

Ha! Ha!

Nu, mi ekretrovas mian ĵusan penson

Jen:

Neniam mi diros, ke mi pensas,

do mi ekzistas!

Malĝusta tio estas

La plantoj, la montaroj ekzistas

Ankaŭ la maroj, eĉ la ĉielo

Mi vidas la sunon, la lunon

Tamen ĉiuj ne pensas, ne eblas

Kial vi ofte dirintus tion?

Ĉu vi timas esti malvivanta?

Vi ne respondos, ĉu?

Atendu, mi ekpripensas ans-tataŭ vi...

He! He!

Finfine mia tagpenso pripensas,

ĉu ne?

Ne!?

Concours

L'Est Républicain
de la 27.05.2014

Primée par un journal chinois

ELLE A DÉCOUVERT LE CONCOURS en surfant sur internet. « Je suis tombée sur un journal numérique chinois en langue espéranto « El Popola Ĉinio » (La Chine populaire). Début 2013, il proposait pour la première fois un concours d'écriture. Il fallait envoyer un poème, une nouvelle ou une prose dans la langue internationale », explique Catherine Hel, 56 ans. L'habitante de Xeulilly apprend l'espéranto depuis 2011 à la MJC Desforges. « Je me suis dit, pourquoi pas. J'ai écrit une poésie "Tagpenso" qui veut dire Pensée du jour. Et une nouvelle, "Kiam mi estis knabino" (Quand j'étais petite) où je raconte comment j'avais économisé mon argent de poche pour m'acheter la petite télé de poche promise sur une publicité à la radio. C'était en fait le lancement pour le magazine Télépoche... »

Trente participants du monde entier

En décembre, les résultats du concours d'écriture tombent :

Catherine Hel gagne le 2^e prix pour sa nouvelle et le 3^e prix pour son poème. Ces jours-ci, elle a reçu par la poste deux diplômes et trois livres de littérature chinoise en espéranto. « Ça fait super plaisir, surtout qu'on était une trentaine du monde entier à participer », s'exclame Catherine, qui n'a « pas fait beaucoup d'études » et a eu envie d'apprendre une langue étrangère après avoir élevé ses trois garçons. « J'ai choisi l'espéranto car c'est très agréable et très facile. En six mois on peut très bien se débrouiller. » Si en Chine, la langue est appréciée et plus développée qu'en France, c'est, dit-elle, « parce qu'elle se construit de la même manière que le chinois, à partir des racines des mots. » Catherine continue à étudier l'espéranto à la MJC avec 4 autres mordus. Et pour le 2^e concours d'écriture organisé par la revue chinoise, elle a déjà envoyé 4 poèmes et une nouvelle...

C.B.-I.

Site : esperanto-nancy.fr

Nia partopreno en la 91-a Germana Esperanto-Kongreso en Erfurt (Turingio).

Pro neantaŭvidita truo en la densa vivprogramo de sufiĉe freŝaj emeritoj, ni subite decidis ĉeesti la 91-an Germanan Esperanto-Kongreson en Erfurt kaj kompreneble ankaŭ turismi. La vetero estis belega kaj varmega.

Post la aliĝo ni unue malfermis niajn verdajn tekojn kun la sur-skribo „ESPERANTO – LA LINGVO“, kio certe memorigas al iuj inter vi faman reklamon priaŭtomobilan.

La teko estis ege riĉenhava, multis la dokumentoj pri la urbaj vidindaĵoj, kun bone uzablaj urboplanoj. Perfektis la prezentolibretoj pri la kongresa programo kaj ege kompleta gvidlibro en Esperanto, kiu ebligis antaŭstudi la vidindaĵojn. Kvankam ĝi estas universitata urbo, Erfurt estas mezgranda urbo. Jen ega avantaĝo por kongresanoj, ĉar inter la elektitaj kongreseroj, eblis fari vizitojn, eĉ sen uzo de la trafikiloj.

La prezentojn faris la juna kaj dinamika prezidanto Sebastian KIRF kaj la kongreso disvolviĝis en loka liceo protestanta kies aŭlo kapablis enteni ĉiujn gekongresanojn. La fakkunvenoj kaj aliaj kongreseroj plej taŭge lokiĝis en la diversaj klasĉambroj. Cetere: du grandaj paneloj ĉe la enirejoj informis la publikon pri la aranĝo.

Pro la granda vario en la programo mi citu nur kelkajn erojn ĉeestitajn:

- Dr. Bernd KRAUSE prezentis al ni la historion de Turingio.
- Ne mankis programero pri Martin Luther laŭ muzikteatra prezento. Disputis sursceneje la studento Martin Luther kaj la gastejestrino Barbara. Ornamas la tuton anĝelaj kantoj je la laŭdo de Dio kaj infernaj kantoj taŭgaj por trinkejoj kaj tavernoj. Majstre uzatis ege granda gamo da muzikinstrumentoj (gurdo, ŝalmo, psalterio, sakfajfilo, krumhorno).
- Dufoje la eksa profesia pola filmisto Roman Dobrzyński prezentis filmojn: la unua montris turisman aranĝon en Nepalo organizitan de Nepala Esperanto-Asocio. Estis vera plezuro spekti la kolorriĉajn bildojn kaj vidi, kiel spontane kaj ĝoje la junaj genepalanoj nin informis en Esperanto. En la dua ni spektis Esperanto-feriadon en la „Zamenhofa Kuracejo“ Szczawno-Zdrój (la tiama Obersalzbrunn); ĝi estis parto de prelego pri la verkado de la de vi certe konata libro „LA ZAMENHOF-STRATO“.
- Dum la dimanĉa vespero okazis podia diskuto en la germana lingvo pri Esperanto gvidata de ĵurnalisto de la radio-stacio FREI. Surpodiis: Dr. Detlev BLANKE, Gerrit BERVELLING, Konrad GRAMMELSBACHER kaj Dr. Rudolf FISCHER.
- La UEA-estrarano Stefan MACGILL koncize prezentis skizon de la reklamstrategio de UEA, kiun li diskonigos pli precize en seminarioj de diversaj landaj Esperanto-asocioj.
- Novaĵojn pri EDE, la partio EŬROPO - DEMOKRATIO – ESPERANTO, donis Konrad GRAMMELSBACHER kaj mi havis la okazon informi pri la rezultoj de EDE en Francio. Dum en aliaj landoj ofte malfacilis enlistigi virinojn, la situacio estis modela en Francio, kie ĉiuj listokapoj estis virinoj. Ankaŭ konstateblis eta kresko de la balotintoj, kiuj elektis tiun ĉi liston.
- Inter la multaj kongreseroj nin ankaŭ interesis prezento de la lasta libro de Gerrit BERVELLING „Konciza historio de kristanismo“ fare de la verkisto mem. Tio ja plej taŭge kongruis kun vizito de urbo, kie studis la juna Martin LUTHER!



Se famulo kia Martin LUTHER studis en Erfurt, alia famulo, nome Johann Sebastian BACH, loĝis en la najbara plej malnova turingia urbeto ARNSTADT. Tra ĝi nin majstre gvidis Corinna SCHWAIGER. Sur placo aperis statuo de la juna BACH en pozo iom malkonvena de juna diboĉulo. La statuo kaŭzis disputojn: ĉu prezenti tiun genian muzikiston tiamaniere?

Plej allogis nin la muzeo, en kiu eblis malkovri du originalajn orgenajn pupitrojn plurklavarajn, sur kiuj BACH ludis kaj pri kies konstruo oni petis liajn konsilojn de eksperto. Tre precizaj estis la klarigoj de Franz-Georg RÖSSLER.

En la evangelia Bach-preĝejo nin atendis la tiea orgenisto, kantoro Jörg Reddin, kiu ludis por nia grupo. Menciindas, ke li majstre prezentis tiun rekonstruitan instrumenton kun hodiaŭ nenormaj klavaroj. Kaj la elekto estis bona: post la iom regula koralpreludo "Allein Gott in der Höh sei Ehr", li prezentis ties ekscentran specimenon el la geniula tempo de Bach en Arnstadt. Lia lasta prezentaĵo estis improvizaĵo, dum kiu li reliefigis ĉiujn muzikajn eblojn de sia instrumento. Ke Franz-Georg RÖSSLER ne nur fakulas pri muzikhistorio, tion ni spertis poste: kune kun sia edzino ĉe la bekfluto ankaŭ li plej



lerte koncertis. Kia frandaĵo!

Pro familiaj devoj mi ne plu povis ĉeesti la prilingvaneron de Laura STURM „Derivado de vortoj en Esperanto kompare kun germanaj dialektoj“. Eble mi iam havos la okazon legi pri tiu temo.

Pro spacomanko mi ne parolos al vi pri la privataj vizitoj, kiujn mi faris kun mia edzino, vi restu scivolemaj kaj eble, iam, eĉ sen Esperanto-kongreso, vi emos viziti Erfurt. Cetere: kiam vi vidos la citadelon Petersberg, vi rekonos similaĵojn kun alia elzasa fortikaĵo ne tre for de Mulhouse!!!

Kaj konklude mi ŝtelu reklamsloganon de alimarka aŭto-reklamo: ni vivas Esperanton!

E.L.



76a regiona staĝo de **esperanto**

France-Est

36-a BAVELO-Seminario

17 - 19 Oktobro 2014

Domo Maria Lindenberg, Sankt Peter



La monto Lindenberg estas unu el la grandaj fortolokoj en la Nigra Arbaro. Super la valo Dreisamtal oni rigardas al la monto Feldberg kaj al la vere altaj montoj en la Suda Nigra Arbaro. En la okcidento - se oni bonŝansas - oni vidas la vogezojn. Tiu ĉi loko kiel neniu alia invitas al konsciigo, al retro-rigardo al la tempo de antaŭ 100 jaroj, kiam komenciĝis la Unua Mondmilito. Kadre de diverstemaj prelegoj Ed Borsboom, Bernhard Eichkorn kaj Edmond Ludwig per tralupea rigardo al la sorto de unuopaj homoj alproksimigos al ni la tiamajn okazaĵojn.

Aldone al tio la pejzaĝo de la natura parko Suda Nigra Arbaro instigas, portempe sin liberigi de la ĉiutagaj rapideco kaj premo kaj de la bruo de la urboj. Eblecoj por ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo kaj al la lago Titisee subtenos tion.

Wallfahrtskirche Maria Lindenberg

Kiel kutime ni ne neglektos la lingvan flankon. Krom la "klasikaj" kursoj por komencantoj kaj progresintoj ankaŭ ĉi-foje estos paroliga kurso kaj la prelegoj de la t.n. bukeda kurso. En internacia etoso kun multaj partoprenantoj el najbaraj landoj el lingvolernado rapide fariĝas lingva vivaĵo.

Kompletigos la aranĝon instiga vespera programo.
Foto Sankt Peter: Wikimedia Commons
Foto Pilgrima Preĝejo Maria Lindenberg: Joergens.mi/Wikipedia, permesilo CC-BY-SA-3.0 (de)

Programo de la BAVELO-Seminario 2014

Kursoj kaj petataj prelegantoj

A - Kurso por komencantoj 1 (Frank Vogler)
B - Kurso por komencantoj 2 (Johannes Mueller)
C - Paroliga Kurso - Konversacio/diskutado pri interesaj temoj (Edmilson Lima Serejo)
D - Bukeda Kurso por progresintoj kaj spertaj parolantoj; celataj temoj:

100 jarojn post la "Granda Milito" (Ed Borsboom)
Max Josef Metzger - Kiel la milito faris el li pacaktiviston (Bernhard Eichkorn)
Kiel vilaĝo disŝiriĝis pro la milito (Edmond Ludwig)
Kiel akvo de'l rivero - La verkisto Raymond Schwartz (Edmond Ludwig)
Novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias)
Retro-rigardo al la pasinta jaro per bildoj (Ursula Niesert)

Turisma programo, i.a.

- (A1) Promenado al St. Peter (pitoreska vojo, ĉ. 3 km) aŭ
(A2) Vizito ĉe unu el la multaj abelistoj de la regiono; poste komuna gvidado tra St. Peter kun Bernhard Eichkorn.
(B) Ekskurso al la lago Titisee.



Horaro

Vendredo, 17-a de oktobro

15:00 - 15:30 Alvojaĝo de frualvenantoj
15:30 - 17:00 Ekskurso por frualvenintoj
17:00 - 18:00 Alveno, akcepto, distribuaĵo de ĉambroj, pliaj informoj
18:00 - 19:00 Bonveno kaj vespermanĝo
19:00 - 20:00 Kursoj - parto 1
ekde 20:15 Vespera programo (interkonatiĝo, filmo) poste trinkejo ("knajpo")

Sabato, 18-a de oktobro

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
09:00 - 10:15 Kursoj - parto 2
10:30 - 11:45 Kursoj - parto 3
12:00 - 13:00 Tagmanĝo
14:00 - 17:00 Ekskursoj (St. Peter, lago Titisee, vidu supre)
17:00 - 18:00 Citro-koncerto (planata)
18:00 - 19:00 Vespermanĝo
19:00 - 20:15 Kursoj - parto 4
ekde 20:15 Muzika vespera programo poste trinkejo ("knajpo")

Dimanĉo, 19-a de oktobro

07:30 - 08:30 Matenmanĝo
08:00 - 09:00 Diservo (Bernhard Eichkorn)
08:30 - 09:30 Forlasado de la ĉambroj
09:30 - 10:30 Kursoj - parto 5
10:30 - 11:30 Kursoj - parto 6
12:00 - 13:30 Tagmanĝo, adiaŭo

Sankt Peter estas vilaĝo en la natura parko Suda Nigra Arbaro (Südschwarzwald), ĉ. 20 km oriente de Freiburg. La seminario okazos en la Domo Maria Lindenberg, seminariejo kaj ripozejo de la diocezo Freiburg, situanta iom ekstere de la vilaĝo.

Haus Maria Lindenberg ((vidu pli malsupre ĉe Alvojaĝo)
Lindenbergstraße 25
79271 Sankt Peter
Tel: 0 76 61 / 9 30 00
Fax: 0 76 61 / 93 00 33

Alvojaĝo per trajno:

Veturu ĝis la ĉefstacidomo de Freiburg, de tie per buso tra Glottertal al St. Peter. Alternative per trajno al Kirchzarten, post per buso al St. Peter.

Alvojaĝo per aŭto:

Sur aŭtoŝoseo A5 (Frankfurto-Bazelo), elirejo Freiburg Nord. Tra Glottertal al St. Peter, de tie restas ankoraŭ ĉ. 3 km ĝis Lindenberg (simple sekvu la ŝildojn).

La mapo montras la pozicion de gastejo sur la monto Lindenberg - Domo Maria Lindenberg estas najbara konstruaĵo samloka.

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas. La aliĝo validas post alveno de mono:
Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM ret-adreso:andreo.ag08@free.fr

Aliĝilon bonvolu sendi al:

S-ino Inge SIMON,
Brünner Str. 20
DE-73431AALEN
Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.
Simon@esperanto.de

Haus Maria Lindenberg
Lindenbergstraße 25
79271 Sankt Peter

Telefono: 0 76 61 / 9 30 00
Telefakso: 0 76 61 / 93 00 33

Kostoj:

La aliĝkotizo estas 30 €
10 € por gejunuloj ne pli ol 26-jaraj.
Aldoniĝos laŭkaze la kostoj por tranoktado/manĝado en la seminariejo resp. por biletoj dum la ekskursoj.
Kostoj por du tagoj inkluzive de manĝado en la Domo Maria Lindenberg: 2 tranoktadoj en dulita ĉambro: 100 €, en unulita ĉambro 130 €.



Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Sankt-Peter

S-ro S-ino	Familia nomo		Persona nomo	Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon <input type="checkbox"/> A <input type="checkbox"/> B <input type="checkbox"/> C <input type="checkbox"/> D Mi / ni interesiĝas pri la programero por fru-alvenantoj: <input type="checkbox"/> Jes <input type="checkbox"/> Ne Mi alvenos per aŭto <input type="checkbox"/> per publikaj transportoj <input type="checkbox"/>
1				
2				
Adreso				Mi / ni volas tranokti en la Domo Maria Lindenberg <input type="checkbox"/> en unulita ĉambro <input type="checkbox"/> en dulita ĉambro
Telefono:				Manĝoj: <input type="checkbox"/> Mi / ni volas manĝi vegetare <input type="checkbox"/> Alergio kontraŭ <input type="checkbox"/> Sen manĝo
Ret-adreso:				
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est				Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo http://esperanto-bw.de/seminario-eo
Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe	
matenmanĝo				
tagmanĝo				
vespermanĝo				

Ni lernu per distraĵoj

1									
2		■					■		
3									
4					■				
5				■		■			
6							■		
7		■							■
8								■	
9				■					

JGJ

HORIZONTALALE:

1. Arb' kiu donas grandegajn manĝeblajn nuksojn.
2. Rusa montar'. Ree sen konsonantoj!
3. Rulŝtupar'.
4. Mobila objekt' en ĉambro. Kontrakt'.
5. Maljuna. Komenco de stoko.
6. Venenis. Inversa litera nomo.
7. INVERSE: Malkrediti
8. Kurac'.
9. Koro de PINTO. Organo por aŭdi.

VERTIKALE

1. Lok', kie oni cindrigas kadavrojn.
2. Meblo por sidado. Prepozicio.
3. Profesiul', kiu bakas frandajn dolĉaĵojn.
4. INVERSE: mara birdo. Komenco de staĝo.
5. Natria klorid'. Ekstera aspekto de iu.
6. Granda teler'. Kruda gardist'.
7. Spasma kontraĥiĝ' de la torakava. Gigante.
8. Herb' kun flava floraro kaj dentrandaj folioj.
9. Enprofundigos. Nomo de la dekoka esperanta grafemo.

	N	M	O	T	R	Ĝ	U	
	O	Ĝ	U		M	N	E	
	T	A	N		O	U	M	
				E				
	E	O	A		U	T	Ĝ	
	Ĝ	E	R		N	M	T	
	R	N	M		T	E	A	
T								o

Plenigu la tabelon, tiamaniere ke ĉiu linio, ĉiu kolumno, kaj ĉiu kvadrato 3X3 entenu nur unufoje ĉiujn literojn de la vorto MATENRUĜO

KAŜITA PROVERBO

Ordu la frazpecojn por aperigi faman prover-

PRU KTI MAS ESO
 SEP ROM JSE TOE
 MAS NLI DEN

- Kial ĝirafo neniam estas tutsola?



- Ĉar ĝi ĉiam havas kolegon!



SOLVO de la problemo en la 165a "Informilo"

Dankon al nia kutima kontribuanto Joël GRANDJEAN

Kaŝita proverbo : AFABLA VORTO
 PLI ATINGAS OL FORTO

Liter-sudoko:

N	U	T	M	S	I	R	A	O
O	A	S	R	U	N	M	I	T
M	I	R	A	O	T	N	S	U
T	O	A	U	M	S	I	N	R
U	N	I	T	A	R	O	M	S
S	R	M	I	N	O	T	U	A
A	T	U	O	I	M	S	R	N
R	M	N	S	T	U	A	O	I
I	S	O	N	R	A	U	T	M

1	K	A	L	C	I	T	R	E	M
2	A	B	I	■	N	■	A	G	E
3	M	A	G	I	S	T	R	A	T
4	I	T	A	L	I	O	■	R	R
5	O	■	M	A	D	R	I	D	O
6	N	G	E	R	■	P	O	■	P
7	I	E	N	■	T	O	M	B	O
8	S	A	T	S	A	R	■	A	L
9	T	■	O	K	T	O	B	R	O

GJ

Kongreso de Esperanto-France kaj de la Rodanalpa Esperanto-Federacio Chambéry - Savojo 30^{an}, 31^{an} de majo kaj 1^{an} de junio 2014

La urbo Chambéry estis jam elektita por la regiona kongreso de Rodan-alpa Esperanto-Federacio. Al ĝi aldoniĝis la kongreso de Esperanto-France, kiu pro la organizado de la venontjara UK en Lille, preferis ĝin kombini kun regiona kongreso.

La kongresejo estis "La Maison pour tous" en Bissy iom ekster Chambéry kaj iom for de la hoteloj. Ĵaŭde vespere okazis la interkona vespero kun teatraĵetoj fare de lernejoj de Chambéry por prezenti la legendon pri la rokaĵo super la lago Bourget "La dento de la kato".



La Dento de la Kato estas unu el la kulminoj de la monto Kato en la Ĵurasa Montaro kun 1390 m da alteco. Ĝi situas borde de la lago Bourget en la departemento Savojo. La monto-pinto havas la formon de kanino, tamen ne nepre de kato.



Por vendredo estis proponitaj diversaj ekskursoj tuttagaj.

- 1) Per aŭtobuso ĉirkaŭ la lago Bourget
- 2) Piedmigrado al la lago Aiguebelette
- 3) Tra urba ĝardeno piedmigrado al la domo de Rousseau.

Pri la lago

La lago *Bourget* estas la plej granda natura lago en Francio kun 44,5 km; kaj profundo je 145 m. Ĝi estis fosita de la granda kvaternara glaĉero, kiu retiriĝis en la lasta glaciperiodo antaŭ 15000 jaroj. Ĝi kuŝas inter la montoj Alpoj oriente kaj Ĵuraso okcidente. En la lastaj dekaĵ jaroj oni purigis la akvon kaj multe taŭg-aranĝis la bordojn por protekti la medion, la plantojn, la birdojn kaj reenkondukis en la naturon akvotestudojn.



Vendrede okazis tre interesa tuttaga ekskurso ĉirkaŭ la lago Bourget.

De Chambéry ni veturis ĝis la montpasejo *Chat* kaj poste atingis belvederon en la komunumo *La Chapelle-du-Mont-du-Chat*. Tie eblis admiri la vastan kaj neforgeseblan panoramon al la montaroj, al la urboj *Chambéry* kaj *Aix-les-Bains*. Sur la monto *l'Épine* estis pluraj vidpunktoj al la lago, ĝis la ĉarma vilaĝo *Chanaz* ĉe la kanalo *Savière*. Tiu kanalo estas natura akvo-fluejo per kiu la Lago *Bourget* elversigas en la riveron Rodano. Ĝi estas



unu el la unikaj akvo-fluejoj en Eŭropo, kies fluo nature inversiĝas.

En la vilaĝo *Chanaz* post iom da grimpado ni vizitis la nukso-muelejon, kiu produktas oleon kaj plurnaj specialaĵojn el juglandoj kaj aveloj.

Post pieda transiro de la kanalo ni atingis la restoracion *l'Écluse* (la kluzo).

La savoja specialaĵo estis kolbasoj kuiritaj en blanka vino kun polento, kiu estas maizo-kaĉo. Polento estis kvazaŭa pano por montaranoj, kiuj zorgis pri bovinoj kaj produktis fromaĝojn. Ili loĝis en foraj ĉaledoj kaj ne povis aĉeti proviantojn ĉiutage.

La ĉefa nutraĵo konsistis el polento-pano, lakto, fromaĝo kaj foje viando.

Posta vizito estis al la reĝa abatejo *Hautecombe*, kiu situas ĉe la bordo de la lago *Bourget*. En la 19a jarcento ĝi estis rekonstruita laŭ ordonoj de la reĝo Karlo-Felikso de Savojo. Tie nun troviĝas tomboj kaj memoraĵoj de la prauloj de la Savoja dinastio.

Ni revenis laŭ la alia bordo de la lago kaj haltis en la urbo *Aix-les-Bains* por ĝui la promenejon apud la lago.



Vendrede vespere eblis ankoraŭ ĝui la kantojn kaj muzikon de la muzik-lernejoj de *La-Motte-Servolex*. Ili surprizis la publikan per la kantado de la Esperanto-himno.



La vespero finiĝis per la tre faka prelego de *Thierry Delahaye*, botanikisto en la nacia parko *La Vanoise*, pri la aspekto de savoja vivdiverseco.

"Savojo, eksterordinara kontribuado al la vivdiverseco de franca flaŭro".



Sabate matene okazis la Ĝenerala Asembleo de Espéranto-France.

Poste, ĉiuj estis invititaj iri al alia konstruaĵo, por la oficiala aperitivo kun akcepto de urba kultura respondeculino en salono Bisseraine.

En la posttagmezo okazis prelegoj pri "Esperanto, lingvo de paco", fare de Mireille Grosjean; pri "Vivo kaj utilo de Akademia de Esperanto" fare de Brian Moon; pri "Lingva justeco, lingva politiko kaj Eŭropo" fare de Michele Gazzola.

La vespera programo estis iom surpriza kun la koncerto-spektaklo de Attila Schimmer.

Subite al la scenejo alkuris vigla kaj movo-plena artisto

Attila, kiu tuj kantis en Esperanto kaj tiel kaptis la atenton de la publiko. Li estas hungar-devena nun loĝanta en Vieno, Aŭstrio. Lia vigla moviĝo sur la scenejo surprizis ĉiujn, krome li rakontis ankaŭ amuzajn ŝercojn.

Li kantis en Esperanto, en la hungara kaj iom da kantoj en la franca.

Ankaŭ venis al la scenejo Péter Berentei, kiu kantis en la hungara per mirinda barintona voĉo.



La vespero finiĝis per folk-muzik-balo kun KerNoz.

Dankon al la organizantoj pro tiu mirinda kongreso.

Fotoj kaj raporto de Andreo

La 66-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO
17 - 24 majo 2014

Jam la sesan fojon fervojistoj kongresis en Italio. Ĉi-foje la evento okazis en San Benedetto del Tronto, kiu situas ĉe la Adriatika marbordo proksimume 300 kilometrojn sude de Bolonjo. Ĝi estas precipe turisma urbo ornamita per palmoj. Ili beligas la urbon laŭlonge de la strandoj. La pasantoj ĝuas ilian agrablan ombron ankaŭ en promenejoj kaj stratoj. Ĉe la havena moleo impresas reliefe skulptitaj kaj pentritaj ŝtonblokoj, kie multaj vizitantoj ŝatas promeni kaj admiri tiujn nekutimajn artaĵojn.

La kongreson partoprenis 135 geesperantistoj el 19 landoj. La plej malproksimaj venis el Ĉinio, Israelo kaj Kubo. La ĉina delegacio venis ĉefe por inviti



la partoprenantojn al la venontjara fervojista kongreso okazanta en la urbo Kunming de Ĉinio. Estis prezentata mallonga filmo por montri al ni la medion, en kiu oni kongresos.

La kongreso okazis en la kvarstela hotelo Calabresi, kie ni estis varme akceptitaj kaj bone nutrataj per bongustaj manĝaĵoj. La hotelo estas bone lokita apud la urbocentro kaj tute proksime al la plaĝo, kiu longas je kvar kilometroj. En la kunvensalono de la urbodomo estis instalita ekspozicio de miniatura regiona fervojlinio kun funkciaj trajnetoj. Vid-al-vidaj paneloj informis pri la okazanta kongreso kaj pri Esperanto. La balustradon de la hotelo ornamis granda banderolo anoncanta la kongreson kaj apude estis fiksita verda E-flago videbla de malproksime. Do multaj preterpasantoj eksciis pri



la ekzisto de Esperanto. Grandan intereson pri la evento montris ĵurnalistoj. Okazis pluraj intervjuoj kaj aperis multaj artikoloj en lokaj ĵurnaloj, elsendoj en radio kaj en televido.

Dum la solena inaŭguro bonvenigis nin la prezidanto de LKK Vito Tornilo, la honora prezidanto de IFEF Romano Bolognesi, la vicprezidanto de itala E-Federacio Renato Corsetti, la posedanto de la hotelo Fausto Calabresi, la skabeno de la urbodomo kaj la lokaj fervojistoj. Nome de UEA salutis kaj bondeziris sukcesan kongreslaboron Barbara Pietrzak. Salutvortojn aldonis ankaŭ Lina Gabrielli, konata itala poetino. Sekvis salutoj de reprezentantoj de la landaj asocioj. LLK-anoj ricevis donacojn de kelkaj salutantoj. Jindřich Tomášek la ĉefdelegito de IFEF legis alvenintajn salutmesaĝojn. La prezidantino de IFEF Rodica Todor honorigis meritplenajn personojn per diplomo kaj post sia festparolado ŝi malfermis la kongreson. Poste sekvis komuna fotado antaŭ la hotelo.

Dum la kongresa semajno okazis pluraj labor- kaj komitatkunsidoj, prifervojaj fakprelegoj. Kunvenis ankaŭ terminara komisiono por decidi pri kelkaj fervojaj terminoj. Rodica Todor proponis ŝanĝojn



kaj reorganizado de la strukturo en IFEF kaj iniciatis grupan laboron laŭ la modelo de UEA. Oni informis pri movadaj aferoj kaj novaĵoj el la fervoja mondo. Interesis novaĵo el Japanio pri refunkciigita Sanriku-fervojo nur kvin tagojn post la tertremo kaj cunamo en la jaro 2011. Krome estis proponita ILEI baza kurso de Esperanto.

La partoprenantoj ĝuis ĉiutage vesperajn kulturajn programerojn. Kantis por ni Grazia Barboni, Manuel Rovere regalis nin per romantikaj kantoj kaj de la Trio "Malamuzika" ni aŭskultis napolajn melodiojn. Tre agrabla estis vespero ekstere



en la apuda parko, kie ni aŭskultis belajn italajn melodiojn el sesdekaj kaj sepdekaj jaroj kaj samtempe ni ĝuis dancrezenton. Ne mankis folkloraj prezento kaj posta dancado sub stelplena ĉielo. Surprize nia ĉina samideano kantis itale "O Sole Mio".

Dum la ekskursoj estis eble viziti Marmuzeon. Kun loka ĉiĉeronino ni promenis tra la urbo aŭskultante klarigojn pri ĉiuj modernaj kaj novstilaj skulptaĵoj. Tre enhavriĉaj estis kongresaj kaj postkongresaj ekskursoj! Ni vizitis urbon Asoli Piceno, kie ni estis akceptitaj en la urbodoma kunvenejo. En Loreto ĉarmis la Sankta Domo, en Recanati pa-



laco Leopardi de la 18-a jarcento, en Castelfidardo ni admiris kolekton da akordionoj kaj viglan akordioniston, kiu regalis nin per gajaj muzikaĵoj. En Ancona ni renkontis s-ron Aldo Grassini, kiu en ĉi loko iniciatis taktilan muzeon "Omero". Oni povas tuŝi ĉiujn objektojn. La muzeo estas konceptita ĉefe por blinduloj. La urbo Ripatransone ĝueblas per sia historia centro kaj famas pro la plej mallarĝa strateto en Italio. En la vilaĝo Offida ĉirkaŭata de vinberejoj ni gustumis tieajn vinojn, kiujn ni povis poste aĉeti. Ĝis nun estas en la urbo praktikata tradicia punto-arto.

vis poste aĉeti. Ĝis nun estas en la urbo praktikata tradicia punto-arto.

La postkongresaj ekskursoj gvidis nin unue al Frassassi-kavernoj. Admirinda sceno atendis nin subtere. En la urbeto Civitella del Tronto troviĝas la dua plej granda defenda konstruaĵo en Eŭropo. Ni trapasadis tiun fortikaĵegon de unu ekstrema flanko al alia. Kaj la postkongresan ekskurson ni finis en la urbo Fermo.

La italaj esperantistoj preparis enhavriĉan kongreson en agrabla ĉe-mara loko. Laŭdinda estas la belaspekta ilustrita kongresbroŝuro kun bonvenigaj paroladoj de diversaj personoj kaj informoj pri ĉiuj okazaĵoj, pri vizitotaj lokoj dum la ekskursoj. Krome estis eldonitaj tre belaj bildkartoj kaj glumarkoj respegulantaj trafan fervojan simbolon. Ni povis ĝui senpagan tutsemajnan busveturadon tra la tuta urbo. Funkciis ankaŭ libroservo provizita de

Petro Chrdle el Ĉeĥio. Ĝuante, ĝojante kaj distriĝante plene ni havis tre bonan impreson pri la ĉi-jara fervojista E-kongreso. Ĝi estos memorinda pro abundaj kaj tre bongustaj manĝoj en la hotela restoracio Calabresi.

Koran dankon meritas niaj italaj kolegoj kaj ĉiuj, kiuj kontribuis al bona disvolviĝo de la evento kaj amplezene zorgis pri la bonfarto de ĉiuj partoprenantoj!

Liba Gabalda






El nia fototeko
Kongreso en
en Chambéry



Tuttaga ekskurso



Fotoj ĉe la lago Bourget okaze de franca-Esperanto kongreso en Chambéry majo 2014